1. Kiun filmon vi preferas?
2. Kiun restoracion vi preferas?
3. Ĉu ekzistas manĝaĵo, kiun vi tute ne ŝatas?

1. Ĉu vi bone akordiĝas kun viaj gefratoj?
2. Ĉu iu el viaj familianoj malsanas?
3. Ĉu vi ŝatas labori?

1. Kiun bruon aŭ sonon vi malŝatas aŭdi?
2. Kiu zorgas pri vi, kiam vi malsanas?
3. Kiun sezonon vi preferas?

1. Kio ridegigas vin?
2. Pri kiu familiano vi pleje fieras?
3. Ĉu vi foje helpas viajn gepatrojn prepari la manĝon?

1. Kiun beston vi preferas?
2. Kiun manĝon vi preferas?
3. Kiun frukton vi preferas?

1. Ĉu vi preferas iri al maro aŭ al montaro?
2. Ĉu vi timas fulmotondron?
3. Kiujn feriojn vi preferas?

1. Kian matenmanĝon vi preferas?
2. Kiajn rakontojn vi ŝatas aŭskulti?
3. Ĉu, laŭ vi, tempo pasas tro rapide?

1. Se vi estrus vian lernejon, kion vi ŝanĝus?
2. Ĉu vi pruntedonas viajn ludilojn?
3. Ĉu vi jam estis en infanferiejo? Kion vi preferas memori pri ĝi?

1. Kiun deserton vi preferas?
2. Kiun vi preferas viziti?
3. Rakontu pri via plej bela karnavala aŭ halovena kostumo?

1. Ĉu vi longe babilas telefone? Kiu estas via rekordo?
2. Kiu estas via idolo (ĉefrolul(in)o, kantist(in)o)?
3. Ĉu vi ŝatas monon? Ĉu vi havas bankkonton?

1. Kiun legomon vi preferas?
2. Kiel estas dekoraciita via ĉambro?
3. Ĉu vi havas ian kolekton? Se jes, kion vi kolektas?

1. Kion vi faras kutime semajnfine?
2. Kiu estas via plej ŝatataj aktoro kaj aktorino?
3. Kiu estas via plej ŝatataj kantisto kaj kantistino?

1. Kian bruon aŭ sonon vi preferas aŭskulti?
2. Ĉu plaĉas al vi danci?
3. Ĉu vi preferas dolĉaĵojn aŭ salaĵojn?

1. Kiun onklon aŭ onklinon ĉu vi preferas?
2. Kial oni ŝatas esti kun vi?
3. Rakontu pri la lasta libro, kiun vi legis.

1. Ĉu vi hontas pri stultaĵo aŭ misaĵo, kiun vi faris?
2. Ĉu vi opinias vian familion simpatia?
3. Kiun beston vi pleje timas?

1. Ĉu vi ŝatas iri al lernejo?
2. Ĉu vi jam trinkis alkoholaĵon (bieron aŭ vinon)?
3. En kiu ĉambro de via hejmo vi pasigas plej multan tempon?

1. Kiun ludon vi preferas?
2. Kiun ekskurson vi preferas?
3. Kiun sporton vi preferas?

1. Kiun lernerjan fakon vi preferas? kaj kiu malpleje plaĉas al vi?
2. Ĉu vi ordigas viajn aferojn hejme?
3. Ĉu vi havas karesnomon? Se jes, kiun?

1. Ĉu vi preferas duŝi aŭ bani vin?
2. Ĉu vi jam trinkis kafon? Ĉu plaĉas al vi ĝia odoro?
3. Ĉu vi preferas ellitiĝi frue aŭ malfrue?

1. Kiun odoron vi malpleje ŝatas?
2. Ĉu plaĉas al vi la modo? Ĉu vi opinias vin laŭmoda?
3. Kion vi faros per 20€?

1. Ĉu vi donis al vi mision realigotan en la vivo?
2. Kiam vi havas problemon, kiel vi solvas ĝin?
3. Kiam vi koleras, kion vi faras?

1. Kio ĉiam ridigas vin?
2. Kiuj estas viaj plej bonaj amik(in)oj kaj kiuj estas iliaj kvalitoj?
3. Ĉu vi estas konata en via lernejo?

1. Ĉu vi jam donis monon al almozulo?
2. Ĉu vi timas la novan lernejojaron?
3. Al kiu vi ŝatus simili?

1. Ĉu vi starigas multajn demandojn en la vivo? Se jes, kiujn?
2. Ĉu vi timas iri al dentisto aŭ al kuracisto?
3. Kion vi preferas fari kun via familio?

1. Ĉu vi laboras volontule?
2. Citu taskon, kiun vi faras bonkore hejme, kaj alian, kiun vi tute ne ŝatas fari?
3. Kiu donaco ĉiam plezurigas vin?

1. Ĉu vi preferas viziti teatron aŭ kinejon?
2. Kiu estas via preferata kanto?
3. Ĉu vi jam laboris por mono?

1. Ĉu vi estas timema?
2. Kian muzikon vi aŭskultas plej ofte?
3. Kiu estas via plej granda plezuro en la vivo?

1. Kion vi pleje timas en la vivo?
2. Ĉu vi jam ricevis premion aŭ rekompencon?
3. Kun kiu vi plej bone akordiĝas en via familio?

1. Kion vi preferas legi: bildstriojn, romanojn aŭ revuojn?
2. Rakontu al ni pri instruist(in)o, kiun vi tre ŝatis.
3. Rakontu pri familia ekskurso, kiu plaĉis al vi.

1. Ĉu vi ŝatus havi aliajn gefratojn?
2. Ĉu vi ricevas poŝmonon? Se jes, kiom?
3. Ĉu oni jam flegis vin en hospitalo?

1. La rolon de kiu kinohero(in)o vi ŝatus ludi?
2. Kiuokaze vi pleje sentas ĝenon? Ĉu vi foje ruĝiĝas?
3. Kiu helpas vin pri hejmtaskoj?

1. Kiu(j)n vestaĵo(j)n vi preferas porti?
2. Pri kio vi pensas vespere antaŭ endormiĝi?
3. Rakontu pri ekskurso kun viaj amik(in)oj?

1. Rakontu pri manĝaĵo, kiun vi bone preparas?
2. Kiun lokon vi preferas por legi?
3. Ĉu ekzistas io, kion vi ŝatus fari sola?

1. Kiu estas via plej ŝatata televidelsendo?
2. Kiu estas via preferata ŝatokupo?
3. Kiu estas via preferata revuo?

1. Kia persono vi estas?
2. Ĉu vi jam inventis sekretan lingvon kun viaj amik(in)oj?
3. Kiun personon vi pleje admiras en la mondo?

1. Ĉu, laŭ vi, vi estas simpatia kaj laŭmoda?
2. Ĉu vi ŝatus esti ununura infano? Kial?
3. Kion vi ŝatas fari malpermese?

1. Ĉu vi deziras edz(in)iĝi iam? Al kiu?
2. Ĉu laŭ vi, fantomoj ekzistas?
3. Ĉu vi jam fumis cigaredon?

1. Rakontu pri ekskurso, kiun vi ŝatus fari kun via klaso?
2. Kion vi faras dum ferioj, kiam pluvas?
3. Kiu estas la plej bela donaco, kiun vi ricevis?

1. Kiun televidelsendon vi ŝatus partopreni?
2. Ĉu vi havas ĉiusemajnan okupadon? Kiun?
3. Kiel vi priskribus vian familion?

1. Kiajn legaĵojn vi preferas?
2. Kiun gardist(in)on vi preferas?
3. Kia besto plej bone reprezentas vin?

1. Se oni proponus al vi aktori en televido, kiun rolon vi preferus?
2. Ĉu vi timus teni serpenton enmane?
3. Se vi estus ĉefministro, kion vi ŝanĝus?

1. Se arbo povus produkti laŭvole aĵon aŭ manĝon de vi ŝatatan, kio ĝi estus?
2. Se vi povus vojaĝi trakosme, sur kiun planedon vi flugus?
3. Se vi havus robotojn hejme, kion vi farigus al ili?

1. Ĉu vi deziras viajn feriojn tuj? Kie vi pasigos ilin ĉi-jare?
2. Kiel vi konvinkus viajn gepatrojn havi hipopotamon hejme?
3. Se vi povus elekti, en kiu lando vi ŝatus vivi?

1. Rakontu pri eksterordinara ago, kiun vi faris iam?
2. Kiom da infanoj vi ŝatus havi iam?
3. Ĉu vi ŝatus labori en farmbieno? Kial?

1. Ĉu ia odoro memorigas al vi specifan memoraĵon?
2. Kiu estas la plej bela gesto, kiun vi faris al iu?
3. Kiun superpovon vi ŝatus posedi?

1. Se oni invitus vin vojaĝi kosmen, ĉu vi irus?
2. Ĝis kiomaĝe vi ŝatus vivi?
3. Kiel vi ŝatus, ke oni festu vian naskiĝdatrevenon?

1. Se vi gajnus ĉe loterio, kion vi farus?
2. Se vi povus ŝanĝi ion en la mondo, kion vi ŝanĝus morgaŭ matene?
3. Se vi renkontus vian preferatan aktor(in)on, kiel vi reagus?

1. Ĉu oni kantas amuzan kanton en via familio?
2. Ĉu vi preferas vivi en urbo aŭ kamparo?
3. Se vi estus famulo, kiu vi estus?

1. Kion vi kunportos sur senhoman insulon?
2. Ĉu gravas al vi havi bone pagatan laboron?
3. Ĉu vi foje uzas krudajn vortojn? Kiujn?

1. Ĉu vi havas malbonan kutimon, kiun vi dezirus malaperigi? Kiun?
2. Kiuj estis la kvin plej intensaj minutoj en via vivo?
3. Se vi aĉetumus, kiujn kvin aĵojn vi metus en vian aĉetĉareton?

1. Kiun ttt-ejon vi vizitas plej ofte?
2. Kiel vi montras vian ĝojon?
3. Kiun karesnomon oni jam donis al vi?

1. Ĉu vi saltus de ponto piedojn fiksitaj per elastaj bendoj?
2. Se vi povus vojaĝi tratempe, kiun epokon vi elektus por vivi?
3. Se vi povus elekti, kiun talenton vi ŝatus posedi?

1. Se vi povus esti famulo aŭ ĉefrolulo, kiu ŝatus vi esti?
2. Se vi povus, kiun vian korpoparton vi ŝanĝus?
3. Se vi verkus libron, kian rakonton vi verkus?

1. Ĉu vi jam havis genian ideon?
2. Se vi estus heroo aŭ heroino de bildstrio, kiu estus vi?
3. Se vi povus elekti, kie vi loĝus?

1. Se vi devus fari tri dezirojn, kiujn vi farus?
2. Se via hejme brulus, kion vi elportus unue?
3. Kiun aĝon vi pleje dezirus havi?

1. Ĉu vi ankoraŭ havas ludilon aŭ aĵon el via infaneco? Kiun?
2. Ĉu vi jam blokis vian kapon inter stangoj?
3. Kiu estas via plej bela memoraĵo?

1. Se vi povus decidi, kiaj estus urboj?
2. Ĉu vi foje revas flugi kiel birdo?
3. Se vi povus elekti transportilojn, kiujn vi elektus?

1. Ĉu, kontraŭ mono, vi metus lumbrikon en vian buŝon?
2. Kun kiu vi ŝatus aŭ ne ŝatus esti sur dezerta insulo.
3. Kiun kvaliton vi serĉas ĉe aliuloj?

1. Se vi povus elekti, kiun profesion vi dezirus havi iam?
2. Se vi povus ŝanĝi ion pri via tagordo, kio estus tio?
3. En kiu fako vi ŝatus gajni olimpikan medalon?

1. Se vi estus esploristo, kiun trezoron vi ŝatus malkovri?
2. Kiomaĝa vi lernis bicikli? Kiel tio okazis?
3. Kiun tekston vi iam parkeris? Ĉu vi memoras ĝin?

1. Ĉu vi jam organizis feston por iu?
2. Ĉu plaĉus al vi partopreni Olimpiajn Ludojn? Pri kiu sporto?
3. Kiun vojaĝon vi ŝatus fari ĉi-jare?

1. Ĉu vi aŭskultas novaĵojn televide aŭ radie? Ĉu vi legas ĵurnalon?
2. Kiun agadon vi faras plej ofte kun viaj amikoj? (ludo, sporto, …)
3. Priskribu la laŭ vi plej bonan instruiston en la mondo.

1. Ĉu foje vi partoprenas di-servojn?
2. Kiel vi difinas feliĉon?
3. Ĉu vi havas personan taglibron?

1. Ĉu ekzistas kanto, kiu pensigas vin pri via patro aŭ patrino?
2. Kiu estas la plej bela gesto, kiun iu faris al vi?
3. Kian avantaĝon donas al vi la fakto esti knabo aŭ knabino?

1. Kie vi ŝatus edz(in)iĝi?
2. Ĉu vi jam rolludis en koncerto aŭ spektaklo?
3. Kion vi unue rigardas ĉe homoj?

1. Ĉu vi jam ploris rigardante filmon?
2. Ĉu vi foje ŝajnigas esti filmaktor(in)o?
3. Kiu pleje ridigas vin?

1. Kia estas, laŭ vi, plej bona amik(in)o?
2. Kiu estis la plej stranga loko, kie vi iam dormis?
3. Pri kiu vundeto vi plej ofte plendas?

1. Kiom aĝa vi estis, kiam unuan fojon vi dormis ĉe amik(in)o? Kio okazis?
2. Ĉu vi jam sentis ĵaluzon? Rakontu.
3. De kiu objekto vi ne povos deteni vin?



1. Ĉu foje vi preĝas?
2. Kio tristigas vin?
3. Kiu aĝo estas la ideala, laŭ vi?

1. Kiu estas la plej granda maljusteco, kiun oni faris al vi?
2. Ĉu vi preferas naturan aŭ homfaritan belecon?
3. Kiam okazis via lasta disputo?

1. Dormante, kiun sonĝon vi faras plej ofte?
2. Ĉu okazas al vi, ke vi ne sukcesas endormiĝi?
3. Kiel vi imagas vian plej belan kristnaskofeston?

1. Ĉu, laŭ vi, ekzistas vivo sur aliaj planedoj?
2. Rakontu la plej bonan ŝercon, kiun vi scias?
3. Ĉu vi kredas je reenkarniĝo, t.e. vivi en nova korpo post morto?

1. Ĉu ekzistas altvalora objekto, kiun vi ŝatus konservi tutvive?
2. Kiun talenton vi ŝatus havi?
3. En kiun beston vi ŝatus reenkarniĝi?

1. Rakontu pri projekto, kiun vi ŝatus realigi?
2. Kiun instruist(in)on vi pleje ŝatis ĉi-jare?
3. Finu la frazon: Mi ŝatus havi …

1. Rakontu al ni historieton, kiun oni rakontis al vi pri viaj prauloj.
2. Kiapozicie vi endormiĝas?
3. Kian vian karaktertrajton vi ŝanĝus?

1. Kiu estas via plej malnova memoraĵo?
2. Kiu malsano nepre ne kaptu vin?
3. Ĉu vi memoras pri rakonto, kiun oni rakontis al vi dum via infaneco?

1. Ĉu viaj amik(in)oj havas aĵon, kiun vi ŝatus posedi?
2. Ĉu vi kapablas imiti iun? Faru!
3. Ĉu vi jam estis tre malsana?

1. Diru tri dezirojn komencante ilin per: Mi ŝatus esti …
2. Ĉu vi jam partoprenis trezorĉasadon? Kiel ĝi okazis?
3. Ĉu vi parfumas vin? Ĉu gravas havi bonan odoron?

1. Priskribu la laŭ vi plej belan domon en la tuta mondo.
2. Kiun ortografian eraron vi faras plej ofte?
3. Kie vi ŝatas sidiĝi en kinejo?

1. Rakontu pri via naskiĝurbo!
2. Ĉu plaĉas al vi via persona nomo? Kiu alia persona nomo plaĉus al vi?
3. Kiun foton de vi vi preferas?

1. Kiun ĉambron vi preferas hejme?
2. Kiun radioelsendon vi preferas?
3. Kiun reklamon vi preferas?

1. Ĉu vi jam perdis vian vojon?
2. Ĉu vi kredas je monstroj (kiel ekzemple tiu de Lok Nes)?
3. Kiun dekoracion vi pleje malŝatas en via hejmo?

1. Kiun vorton vi preferas? kaj kiun vi ŝatas malpleje?
2. Ĉu foje vi serĉas en vortaro?
3. Kiun muzikdiskon vi preferas?

1. Kiu sporto, laŭ vi, estas la plej furora?
2. Ĉu vi havas koramik(in)on
3. Kun kiu persono el via ĉirkaŭo vi havas plej multe da plezuro?

1. Ĉu vi memoras kanton el via infaneco?
2. Kiun kvaliton vi pleje aprezas ĉe viaj amik(in)oj?
3. Kiu estis via plej bela vojaĝo ĝis nun?

1. Kiu evento estis la plej grava al vi ĉi-jare?
2. Ĉu plaĉus al vi estis magiisto kiel Hari Poter? Kion vi farus magie?
3. Kiu estas la plej bela spektako, kiun vi vidis?

1. Kiun muzikilon vi ludas aŭ ŝatus ludi?
2. Ĉu vi ŝatus esti aktoro? Se jes, en kiaj filmoj vi aktorus?
3. Ĉu ekzistas revo, kiun vi ŝatus realigi? Kiun?

1. Ĉu vi jam babilis tujmesaĝile? Se jes, kun kiu?
2. Kio vere kolerigas vin?
3. Kiel vi reagas, kiam vi perdas ludante?